# Flugu, kor', per ĝoj-flugiloj

FRÖHLICH SOLL MEIN HERZE SPRINGEN • ADORU 219




3. Ĉu nin Dio do malamas?
Tute ne, / vidu, ke / Lia amo flamas.
Li ja venas nun por porti
kiel hom' / ĉion krom / propra pek', kaj morti.

4. En la trogo nun Li kuŝas,
vokas al / Sia stal' / nin, kaj korojn tuŝas.
«Karaj fratoj, peko via
kaj la pun' / kuŝas kun / mi en trogo mia.»

5. Are, ope nun rapidu
ĉiu hom' / al la dom', / la Savanton vidu!
Vi ne timu; Lia stelo
vojon al / Lia stal' / montras de l' ĉielo.

6. Kiu en mallumo iras:
Jen la voj' / al la ĝoj', / kiu vin ektiras
al la lumo de l' Sinjoro.
En la flam' / de la am' / ĉesos ĉiu ploro.

7. Nun la kanton pri l' Sinjoro
aŭdu vi. / Laŭd' al Di' / eĥu en adoro.
Eĥu ĉiam tiu kanto
de l' anĝel' / sur ĉiel': / «Venis la Savanto!»

FRÖHLICH SOLL MEIN HERZE SPRINGEN • EG 36 • EM 166 • NAK 16 • M (Fröhlich soll): Johann Crüger 1653 • germana T: Paul Gerhardt 1653 • E: Hans Amund Rosbach, 1971 en AK 38 • 2001 en ADORU 219

↑ Jes 61,10